La 97a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, okazis sukcese. De ĉiuj kongresaj eventoj, mi plej ŝatis la Internacian Artan Vesperon. En la evento ni el Indonezio dancis la tradician dancon *Badinding* (el Sumatro). La spektantoj tre ŝategis ĝin. Fakte, post kiam la danco finiĝis ili aplaudis longe. Kaj poste multaj alterne fotiĝis kun ni. Ni tre feliĉis pro tio.

La feliĉo ne venis nur dum la evento. Post ĝi, kiam ni, indoneziaj kaj alilandaj geesperantistoj, atendis la buson, kiu estis portonta nin al la Hotelo Melia, geesperantistoj el Indonezio kantis kelkajn kantojn por forigi la enuon. Subite aliaj esperantistoj kantis kun ni. Poste ni kune ridante kantis kaj eĉ dancis ĝis la buso venis. Ankaŭ en la buso ni kantadis. La buso bruiĝis per nia voĉo ĝis ĝi alvenis ĉe la hotelo. Estis amuza kaj memorinda sperto.

Kongres Esperanto Universal ke-97 berlangsung dengan sukses. Dari seluruh acara kongres, saya paling suka "Internacia Arta Vespero" (malam kesenian internasional). Dalam acara itu, kami dari Indonesia menari tarian tradisional Badinding. Seluruh penonton sangat menyukai tarian kami. Buktinya, ketika tarian berakhir, mereka memberikan tepuk tangan meriah. Dan setelah itu, orang-orang secara bergantian berfoto bersama kami. Kami sangat senang karena itu.

Kebahagiaan tidak hanya datang selama acara berlangsung. Selesai acara, ketika kami dari Indonesia dan negara lain menunggu bus yang akan membawa kami ke Hotel Melia, esperantis dari Indonesia menyanyikan beberapa lagu untuk mengusir kebosanan. Tiba-tiba esperantis lain bernyanyi bersama kami setelah itu kami bernyanyi dan bahkan menari bersama sambil tertawa hingga bus datang. Di dalam bus pun kami juga bernyanyi. Bus berisik karena suara kami hingga tiba di hotel. Itu adalah hal yang menyenangkan dan patut dikenang.

Eko Nur Syah Hidayat

En la Kongresa Libroservo




De la 26a de julio ĝis la 4a de aŭgusto mi partoprenis la 97an Universalan Kongreson de Esperanto. En la kongreso estas multaj programeroj. Ĉi-sube mi rakontos tre mallonge pri unu el ili, kiu tre plaĉis al mi: la Kongresa Libroservo.

La libroservo estis malfermita en ĉiu tago de la kongreso, escepte de la ekskursaj tagoj, kaj okazis en la salono Sekelĵ. Tie oni povis trafoliumi kaj aĉeti librojn en/pri Esperanto. En la libroservo estis multaj libroj de diversaj ĝenroj: ekz. scienco kaj teĥniko, Esperanto-movado, instrumaterialoj kaj vortaroj, plena verkaro de Zamenhof.

Mi aĉetis tri librojn en la libroservo, unu por lerni Esperanton kaj aliajn du por legi. La tieaj libroj estis sufiĉe multekostaj por mi, ĉar ili estis senditaj tien el Eŭropo.

Erlangga Femayuga

Post jardekojn longa silento, en la fruaj jaroj de la nova jarmilo komencis aŭdiĝi freŝaj E-voĉoj el Indonezio. Inter ili ankaŭ la voĉo de Hazairin R. Junep, kiu fondis la Centron de Esperanto-Studoj en Yogyakarta. Sub la egido de tiu centro, li eldonis en 2007 *Kamus bahasa Esperanto / Esperanto-indonezia vortaro*. La 182-paĝa libro enhavas tre koncizan prezenton de Esperanto por indonezianoj kaj bazan vortaron Esperanto-indonezian. Ĝi mendeblas ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: € 9,90.



Lerneti lokan lingvon

Estis lundo, aŭ la tria tago de la kongreso. Kiel kutime mi venis al la hotelo gastiganta la kongreson. Mi estis okupita elekti la programeron kiun mi volas sekvi. Post kelkaj minutoj mi elektis: mi decidis sekvi la programeron “Vjetnama Eksprese”. En ĝi oni provis instrui al la ĉeestantoj iom de la vjetnamaj lingvo kaj kulturo. Ĝi estis organizita de loka esperantisto. Oni instruis pri la literoj kaj prononco de la vjetnama. Komence la partoprenantoj estis konfuzitaj pri la prononco, ĉar en la vjetnama estas proksimume dudek ses literoj kun malsama prononco. Sed kun la kapabla instruisto, ĉiuj partoprenantoj povis kompreni kaj estis feliĉaj partopreni la programeron.

Gilang A. Jabbar

Georfoj amas Esperanton

La ideo instrui georfojn venis de Suci, Dian, Andini kaj aliaj gemikoj, kiuj volas instrui volontule al georfoj la anglan lingvon, matematikon kaj turismon. Ĉi tiu ideo devenas de la fakto ke la kvalito de la edukado en orfejoj estas malbona. La kondiĉoj (la klasĉambroj, tabloj ktp.) de ĉiuj orfejoj estas malsamaj. Ni instruas en orfejoj kiel volontuloj, por plibonigi la kvaliton de la edukado de georfoj kaj malriĉaj geknaboj. Ni ne havas monon por doni al ili, sed ni povas ja doni niajn sciojn. Tio estas la principo. Nu, jen estas tri orfejoj. La studobjektoj malsamas en ĉiu orfejo.

La orfejo en kiu ni instruas ĉiun dimanĉon estas Rumah Anak Madani (RAM). Ĝi estis loko por viktimoj de la cunamo en Aceh, okazinta la 26an de decembro 2004. Ĉiuj kostoj de la manĝaĵoj kaj edukado estas pagataj de RAM. Ĉar la situacio en Aceh pliboniĝis, RAM helpas ankaŭ malriĉajn geknabojn. Nun RAM iĝis CT (Chairul Tanjung) Foundation. CT Foundation estas internulejo nur por malriĉaj geknaboj en la provinco Norda Sumatro. Komence ni instruis al la geknaboj en RAM la anglan lingvon ĉiudimanĉe kaj Esperanton ĉiumonate. Tamen, pro la ŝanĝo de RAM al CT Foundation kaj ankaŭ pro tio ke la gestudentoj volas lerni Esperanton kaj la anglan lingvon pli serioze, ni faris planojn pri instruado de Esperanto kaj la gramatiko de la angla lingvo ĉiun dimanĉon. Ni instruas Esperanton angle, por ke la georfoj povu paroli kaj Esperanton kaj la anglan. Reage la geknaboj diras pri Esperanto ke ĝi estas facila, fleksebla kaj neŭtrala lingvo.

La donacoj, kiel libroj de UEA kaj de individuaj esperantistoj, helpas la geknabojn lerni Esperanton pli facile. Plaĉas al la konsilantaro de CT Foundation ke ni instruas la anglan lingvon kaj Esperanton. Mi deziras ke en Indonezio, precipe en Medan, estu multaj esperantistoj. Via subteno tiucele estas bonvena.

Ide mengajar ke panti datang dari Suci, Dian dan Andini serta teman lainnya yang ingin mengajar. Mereka adalah sukarelawan yang ingin mengajar di panti. Tujuan kami ingin memperbaiki kualitas pendidikan dari anak-anak di panti dan orang yang kurang mampu. Walaupun tidak membantu dengan uang, tetapi kita membantu mereka dengan berbagi ilmu yang berguna kapan saja. Kami setiap hari minggu mengajar di Rumah Anak Madani (RAM), yang sekarang mulai berganti menjadi Chairul Tanjung Foundation (CTF). Kami mengajar Esperanto, bahasa Inggris dan menari tarian tradisional. Anak-anak panti senang belajar Esperanto dan mengatakan bahwa Esperanto bahasa yang sangat mudah, fleksibel dan netral.

Reza Pahlevi

Niaj dankoj iras al Peter Browne (Usono) pro lia financa subteno al nia bulteno.

Raporto pri enkonduka kurso kaj datrevena festo de la Ĝakarta E-klubo

Por la Ĝakarta E-klubo oktobro estas speciala monato: la klubo stariĝis la 3an de oktobro 2010, ĉe Plaza Semanggi, Ĝakarta. Tiam, por rememori pri malnovaj tempoj, kunvenis kvin indoneziaj esperantistoj, du ĵurnalistoj kaj tri eksterlandanoj el Aŭstralio kaj Belgio. Ni multe cerbumis kaj diskutis pri la klubo kaj fine decidis ke ĝia nomo estos “Esperiga Suno”.

Ekde la starigo “Esperiga Suno” jam kontribuas per Esperanto-agadoj precipe en la urbo Ĝakarta kaj en apudaj, kiel Bekasi, Depok kaj Tangerang. Pluraj personoj jam lernis kune la lingvon kadre de la klubo. Krome kelkaj el la aktivaj klubanoj individue provas prezenti Esperanton al siaj familioj, geamikoj kaj komunumo. Nun la klubo havas 12 membrojn. Tamen pro troa okupiteco, la klubanoj malofte venas al la regulaj kunvenoj kaj kelkaj ne daŭrigas la membrecon.

Por festi la specialan tagon ni faris malgrandan feston kune kun enkonduka kurso ĉe arbaro de Kebun Raya Bogor. Venis sep klubanoj kaj du novuloj. Je la 12a horo ni komencis la programon per bonvenigaj vortoj de la klub-sekretariino, kiu poste daŭrigis per bonvenigo kaj prezento de la novuloj. Ni kantis kune *La Espero* kaj naskiĝtagan kanton. Ankaŭ Haris, la prezidanto de la klubo, diris kelkajn vortojn al ĉiuj. Dum la programo ni hazarde rimarkis surloke faman artiston, kiu estis faranta televidan programon, kaj kelkaj el ni ŝatis fotiĝi kun li. Surprize, la artisto invitis nin al sia programo kaj permesis al ni propagandi iomete pri Esperanto en ĝi. Bedaŭre ni forgesis demandi kiam la programo dissendiĝos.

Ni finis la kunvenon je la 4a posttagmeze kaj antaŭ ol reveni hejmen trajne, ni manĝis kune. Estis tute agrabla etoso kiun ni malofte spertas pro tempomanko.

Bagi klub Esperanto Jakarta, bulan Oktober adalah bulan spesial. Dua tahun yang lalu klub terbentuk pada tanggal 3 Oktober di Plaza Semanggi, Jakarta. Untuk merayakan ulang tahun klub, kami melakukan pertemuan rutin di Bogor bersama tujuh orang anggota klub dan dua peserta baru. Dalam pertemuan tersebut, kami membuat beberapa program khusus untuk merayakan ulang tahun klub yang diawali dengan kata pembuka dari sekretaris klub, pengenalan peserta baru, bernyanyi bersama himno La Espero dan lagu selamat ulang tahun. Karena terlambat hadir, Haris sebagai ketua klub baru memberikan sedikit kata sambutan kepada semua. Kami selesai pertemuan pada jam 4 sore, dan sebelum kembali pulang dengan kereta, kami makan bersama. Pertemuan yang menyenangkan seperti ini jarang kami lakukan karena masalah waktu.

Ilia Sumilfia Dewi

Sekretariino de la Ĝakarta E-klubo.



Geliat Pergerakan Klub Esperanto Yogyakarta “La Verda Paco”

M. Uwais Sidhi Weiss

Pada tanggal 26 Juli 2012 bertepatan dengan peringatan 125 tahun bahasa Esperanto, Klub Esperanto Yogyakarta, “La Verda Paco”, mengadakan pertemuan perdana. Pada tanggal ini pula disepakati sebagai tanggal berdirinya “La Verda Paco”. Mengapa diberi nama itu? Dalam bahasa Indonesia kata “La Verda Paco” secara harfiah berarti “Hijau Damai”, hijau melambangkan kemakmuran, sesuai dengan *image* Yogyakarta sebagai kota pelajar dan budaya yang makmur dan damai. Hal ini juga selaras dengan tujuan L.L. Zamenhof membuat bahasa Esperanto.

Menurut penuturan anggota klub yang paling tua, Bapak Gunawan umur 69 tahun, keberadaan bahasa Esperanto di Yogyakarta sebenarnya sudah cukup lama, sekitar tahun 50-60an sudah ada kegiatan kursus bahasa Esperanto dan beliau mengikutinya, tetapi kegiatan kursus berhenti karena adanya peristiwa G30S PKI.

Sebelum klub ini didirikan, sudah ada beberapa kali kegiatan belajar bahasa Esperanto bersama Mbak Heidi Goes dari Belgia, Bu Tatjana Loskutova dari Rusia dan Pak Ahmad Modabber dari Iran. Selain itu pernah ada komunitas Esperanto yang didirikan tanggal 10 Oktober 2010 tapi akhirnya bubar. Akhirnya atas inisiatif Mbak Heidi Goes yang ingin membuat Klub Esperanto di Yogyakarta agar gerakan Esperanto di Yogyakarta lebih terorganisasi, tanggal 18 Juli 2012 diadakan pertemuan untuk mendirikan klub. Pertemuan dihadiri oleh Mbak Heidi Goes, Mas Tomy Aditama, Pak Tejo Hindarto, Pak Yohanes Manhitu, Pak Gunawan, Rahmat Milanisti, Eko Paris, Fahrizal Ramadhan, dan M. Uwais SW. Pada pertemuan ini disepakati didirikannya Klub Esperanto Yogyakarta, tapi belum dipastikan namanya, dan mengadakan pertemuan perdana sekaligus penerimaan anggota baru pada tanggal 26 Juli 2012 bertempat di rumah Bapak Gunawan. Ada 18 orang yang hadir dari berbagai profesi dan umur di pertemuan perdana. Sebagian besar masih belum mengenal jauh dan belum menguasai bahasa Esperanto. Namun mereka terlihat semangat untuk belajar bahasa Esperanto. Hal ini terlihat dari salah satu anggota yang hadir yaitu Bapak Muhammad Zaeni, seorang terapis Yumeiho. Beliau menyempatkan diri hadir jauh-jauh dari kota Salatiga ke Yogyakarta (kurang lebih 80 km) mengendarai Vespa untuk mengikuti kegiatan klub. Beliau mengatakan bahwa dia rela melakukan hal itu sebagai rasa terima kasihnya kepada pencipta terapi Yumeiho, Masayuki Saionji, yang ternyata juga seorang esperantis dari Jepang. Beliau juga menyatakan akan mengajak seluruh anggota keluarganya di Salatiga untuk belajar bahasa Esperanto dan datang ke pertemuan klub ketika sempat.

Pada pertemuan perdana ini pelajaran bahasa Esperanto belum dimulai, masih pengenalan dasar tentang sejarah, tujuan, pergerakan, dinamika bahasa Esperanto, pengenalan anggota serta mengetahui motivasi mereka belajar bahasa Esperanto. Pengenalan dasar ini diberikan selain karena yang hadir juga banyak yang belum mengenal bahasa Esperanto, juga agar anggota tidak sekedar menguasai bahasanya saja, tetapi juga memahami nilai filosofis dan gerakan Esperanto. Pertemuan perdana ini bertepatan dengan peringatan 125 tahun bahasa Esperanto, meskipun hanya dirayakan dengan sederhana yaitu pembacaan puisi *La Espero* oleh Pak Yohanes dan menyanyikan hymne *La Espero* bersama-sama, momen yang sangat penting ini bisa lebih menambah semangat teman-teman yang ingin belajar bahasa Esperanto.

Setelah pertemuan perdana, dua minggu kemudian diadakan pertemuan kedua pada tanggal 11 Agustus 2012. Pertemuan ini merupakan pertemuan yang sangat istimewa karena kami kedatangan dua tamu esperantis yang istimewa juga, yaitu Mbak Ilia Sumilfia Dewi dari Klub Esperanto Jakarta “Esperiga Suno” dan Prof. Hans Adriaanse dari Belanda (lihat foto dibawah). Kami sangat senang dengan kedatangan beliau berdua, karena bisa berbagi cerita dan menambah semangat belajar bahasa Esperanto terutama untuk teman-teman yang baru belajar. Mbak Ilia berbagi banyak hal tentang kegiatan “Esperiga Suno” maupun hal-hal umum tentang Esperanto, dan memberikan motivasi untuk kami. Tentunya ini sangat berguna untuk “La Verda Paco” yang masih seumur jagung. Kemudian Prof. Hans, dengan bantuan terjemah oleh Pak Yohanes, bercerita tentang dirinya dan kondisi Esperanto di Belanda. Meskipun dibantu penerjemah karena sebagian besar anggota belum bisa berkomunikasi dengan bahasa Esperanto, Prof. Hans tetap merasa senang karena kami di Yogyakarta mau belajar bahasa Esperanto. Beliau memotivasi kami agar terus belajar bahasa Esperanto, karena pada hakikatnya semua, termasuk beliau, sama-sama masih belajar.

Pada akhirnya kami berharap, sebagai klub Esperanto yang masih muda, “La Verda Paco”, bersama-sama dan dengan dukungan segenap pihak bisa ikut mengembangkan dan memakmurkan bahasa dan gerakan Esperanto di kota Yogyakarta sebagai bagian dari Indonesia dan dunia, agar semakin tercipta perdamaian. Jayalah terus bahasa Esperanto!

[*La E-lingva versio de la ĉi-supra raporto aperos en la venonta numero de nia bulteno.*]

Menciinde

- Selengkapnya ilustrasi artikel tentang Esperanto di Indonesia dapat dibaca di: <http://lifestyle.kompasiana.com/hobi/2012/10/20/komunitas-esperanto-indonesia-semangat-persahabatan-dan-cinta-damai/>.
- Viziton meritas la plurlingva blogo de Yohanes Manhitu, kie Esperanto estas samnivela kun la aliaj lingvoj: <http://ymanhitu.blogspot.com/>. Danke al lia laboro, la Eŭropa himno estas havebla en indonezia traduko: <http://www.europano.eu/eo/documentloader.php?id=319&filename=europano-himno-tradukoj-retejo.pdf>.
- Por tiuj kiuj instruas aŭ planas instrui Esperanton tre bona fonto de utilaj informoj troviĝas ĉe: <http://www.edukado.net/>.



Pri estonto kaj pasinto

Heidi al via urbo en 2013?

Okaze de la Indonezia Esperanto-Kongreso, mi refoje vojaĝos al Malajzio kaj Indonezio. La 8an de marto mi alvenos en Kuala Lumpur. Mi esperas ke dum tiu semajnfino mi povos renkonti personojn kiuj volas lerni Esperanton. Pro tio mi kontaktos la Couchsurfing-grupon de Kuala Lumpur. Mi ankaŭ havas kontakton kun la malmultaj esperantistoj en Malajzio. Pro tio ke la indonezia vizo validas nur 30 tagojn kaj mi reflugos el Jakarta la 11an de aprilo, mi provos eniri la landon la 13an de marto (pli frue ne, pro la vizo, kaj pli poste nur se tio necesas pro E-lecionoj en Malajzio aŭ praktikaj kialoj). Ankoraŭ tute ne certas kiujn urbojn aŭ insulojn mi vizitos (krom, kompreneble, Jakarta kaj Bogor). Mi devas elekti inter urboj kie jam estas grupo aktiva aŭ ne tiom aktiva kaj urboj kie ĝis nun neniu aŭ iu tutsola komencis lerni la lingvon. Pro tio ke mi ankaŭ volas pasigi semajnon en Jakarta por esplori en la biblioteko tie kaj iom en Bogor antaŭ la kongreso, restos nur iom pli ol du semajnoj por iri al aliaj urboj kaj insuloj. Mi povas mem fari elekton, sed mi petas vin pensi, ĉu kaj kion mi povus fari en via urbo. Ĉu via klubo bezonas progresigajn lecionojn kaj pretas kunveni kelkajn fojojn dum kelkaj tagoj? Ĉu via klubo povas (helpi) organizi enkondukan kurson kaj precipe trovi personojn kiuj volas sekvi tiu(j)n lecion(j)n? Se jes, kontaktu min!

Mi mem jam forte pensas reiri al Balio kaj Yogyakarta, eble ankaŭ al Bandung, Semarang, Surabaya, Medan, kaj ŝatus unuan fojon viziti Flores aŭ Padang, sed tamen ne eblos iri al ĉiuj tiuj urboj. Ankaŭ Makassar aperas kiel eblaĵo. Tie estas nun kelkaj junuloj kiuj kun sia docento pri la franca lingvo kreis 'organizaĵon por eŭropaj lingvoj' kaj sine de ĝi volas krei Esperanto-klubon. Por tio ili nun serĉas pliajn interesigantojn pri la lingvo de Zamenhof. Estus bele se tie refoje florus la movado. En tiu urbo jam minimume en 1935 estis esperantistoj. Tiujare eĉ aperis du numeroj de la riĉenhava gazeto *La Sperto...*

Kaj tiel ni alvenis ĉe la pasinto...

Kiel mi montris ĉi-supre kaj kiel M. Uwais montras mallonge en sia artikolo (p. 8), sed malkiel vi eble pensis aŭ supozis, la Esperanto-movado en Indonezio estas jam malnova. Pri la temo mi verkis jam tri artikolojn por *Esperanto en Azio* (elŝuteblajn ĉe <https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/historio-sejarah>; la plenaj numeroj elŝuteblas ĉe www.kaem.org). La movado floris precipe inter la du mondmilitoj, kaj de 1950 ĝis 1965. Mi daŭre, jam de junio 2007, faras esplorojn pri la historio de tiu movado. Ĝiaj du plej grandaj motoroj estis LIEM Tjong Hie (indoneziigita nomo RIMBA Djohar, 1906-91) kaj Rankajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeng (1905-62; en la suba foto, inter Eriko Sunardo kaj neidentigita esperantista pastro). Pri ambaŭ mi volas scii multe pli! Mi jam parolis kun unu el la filoj de Liem Tjong Hie, sed mi trovas neniun el la infanoj de Rankajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeng. Tamen ŝi estis vaste konata kiel verkistino, ĵurnalistino, organizantino de foiroj ktp. En artikolo pri foiro por virinoj en 1956 en Jakarta legiĝas ke ŝi havas 11 genepojn. Mi petas esperantistojn en Indonezio, kaj precipe Jakarta, kie ŝi loĝis, helpi min serĉi ŝiajn infanojn kaj nepojn, ĉar mi ege ŝatus paroli kun ili pri ilia patrino/avino. Ankaŭ pri Liem Tjong Hie (el Semarang) kaj aliaj indoneziaj esperantistoj el la 'antaŭa'/'historia' movado bonvenas informoj. Se vi bezonas pliajn detalojn por povi pli bone serĉi, bonvolu kontakti min per heidi.goes@gmail.com. Antaŭdankon.



Heidi Goes

Liem Tjong Hie naskiĝis la 15an de januaro 1906 en Semarang, Javo. Li studis en la tieaj nederlandaj lernejoj kaj eble tie konatiĝis kun Esperanto, ĉar jam en 1919, nur 13jara, li esperantistiĝis. En 1924 li eldonis la unuan libron en Esperanto pri Javo, *Javaj legendoj kaj fabloj*, de li (re)verkita kaj tradukita. En la sama jaro li la unuan fojon iĝis Delegito de UEA, kio li regule estos ĝis 1989. En 1925 li ekredaktis la revuon *Hinda Esperantisto*, kiu aperos neregule ĝis 1934. Li ankaŭ fondis la eldonejon kaj kursejon *Ekstremorienta Esperanto-oficejo kaj -Instituto* aŭ *Centraal Esperanto-Bureau & -Instituut*.

En 1927 Liem Tjong Hie tradukis kaj eldonis la faman rakonton de Multatuli (1820-87) *Historio de Saidjah kaj Adinda*. Ankaŭ plurajn lernolibrojn li verkis kaj/aŭ eldonis, kaj en la loka lingvo, kaj en la nederlanda: ekz. la malajan ŝlosilon (tradukita en 1928, sed pro teknikaj problemoj ĉe la presisto Belga Esperanto-Instituto, presita nur en 1933), *Esperanto en zĳn verbreiding* kun antaŭvorto de J.H.A. Sens, pri la disvastigo de Esperanto en la mondo (1931), la lernolibron *Leerboek der wereldhulptaal Esperanto* (1932) kaj la informlibreton *Apa itoe Esperanto?* (1933).

Li ankaŭ tradukis la *Fundamenton* en la indonezian. Sub la pseŭdonimo RIMBA Djohar li verkis ankaŭ en la indonezia, i.a. pri religio kaj la ŝtata filozofio *Pancasila*, kaj sub la pseŭdonimo HIE Kiguj li verkis la infanlibron *La varma sudo kaj la frosta nordo* en 1966, eldonitan en Ĉinio. Li aperas en 1981 ankoraŭ en E-ista adresaro, kiel universitata docento. Laŭ informoj ricevitaj pere de liaj kolegoj, li instruis anglan komercan korespondadon kaj leterverkadon en la kolegio *Akademi Bahasa 17 Agustus 1945* (mallonge: Akaba '17') en Semarang. Li forpasis en aprilo 1991.

Rankajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeng naskiĝis en Bukittingi, Sumatro, la 6an de aprilo 1905. Ŝi apartenis al la Minangkabau-popolo, kiu havas matriarkan kulturon. Pri tio kaj pri multaj aliaj por- kaj privirinaj temoj ŝi ofte prelegis kaj verkis, kaj en Esperanto, kaj en la indonezia kaj angla. Ŝi estis defendanto de la virinaj rajtoj kaj aktivis kontraŭ la infankomerco. Ŝi estis konata ankaŭ pro tio ke ŝi organizis ĉiujare la Komerchan Borson por Virinoj en Ĝakarta kaj estis dum jaroj redaktoro de la porvirina revuo *Pedoman Isteri*. En 1950 ŝi lernis Esperanton kaj ekde 1951 partoprenis plurajn Universalajn Kongresojn kaj prelegis interalie en Internacia Somera Universitato en Oslo kaj ankaŭ en Montevideo, kie ŝi vizitis la Universalan Ekspozicion. Ŝi vigligis kaj plifortigis la Esperanto-movadon en Indonezio ekde 1952, kiam ŝi revenis el Eŭropo post sia unua Universalaj Kongreso kaj prelegrondvojaĝo. Ŝi estis prezidantino de Indonezia Esperanto-Asocio, de Sudazia Esperanto-Federacio kaj de Islama Esperanto-Asocio. Ŝi iniciatis kaj subtenis la eldonon de pluraj lernolibroj kaj vortaroj verkita de aliaj indoneziaj esperantistoj. La 23an de novembro 1962 Datoe Toemenggoeng forpasis, nur 57-jara.

Kesanku tentang Esperanto

Saya mulai mengenal Esperanto pada bulan Maret 2012 setelah Ilia memberikan presentasi tentang Esperanto di sebuah grup traveler di Jakarta dan mulai mempelajarinya pada bulan April. Kesan pertama saya terhadap bahasa ini adalah unik. Unik dari sisi bahasa, baik dari pelafalan maupun tata bahasanya. Unik juga dari sisi sejarahnya. Sebagai bahasa yang hampir tidak memiliki "native speaker" dan bukan milik negara manapun juga. Oleh karena itulah saya tertarik untuk mempelajari bahasa ini.

Selama belajar bahasa Esperanto, saya menemukan beberapa kesamaan lafal dan penulisan yang mirip dengan bahasa lain. Selain itu, pengucapan kata-katanya pun sama dengan penulisannya, sehingga memudahkan untuk mempelajarinya. Sebaliknya, kesulitan yang saya hadapi lebih kepada format belajar yang lebih cocok dengan diri saya. Beruntung keberadaan beberapa website untuk belajar mandiri di internet, seperti www.lernu.net sangat membantu dalam mengatasi kesulitan yang saya hadapi.

Meskipun saat ini kemampuan bahasa Esperanto saya masih belum terlalu baik, tetapi saya akan coba terus mempelajari dan menguasainya.

Mi konatiĝis kun Esperanto en marto 2012, post prezentado de Ilia ĉe kunveno de vojaĝanto-grupo en Ĝakarta kaj eklernis ĝin en aprilo. Mia opinio estas ke Esperanto estas unika el lingva kaj ankaŭ el historia vidpunktoj. La lingvo estas facile lernebla kaj, bonŝance, ekzistas kelkaj retejoj por lerni sola la lingvon per interreto. Kvankam nuntempe la nivelo de mia Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉe alta, mi provas daŭrigi ĝian lernadon.

Sasri Wildandini

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah sebuah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan teman-temannya. Tim sukarelawan menulisnya dan buletin ini lahir sebagai wujud terima kasih atas kontribusi para kontributor dalam dan luar negeri, serta atas sumbangan para donatur yang dermawan. Baik tim redaksi maupun kontributor tidak menerima kompensasi apa pun atas karya mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini. Agar tercipta buletin berkualitas sebaik mungkin dan untuk mempermudah pekerjaan redaksi, kami meminta seluruh kontributor untuk membaca dengan teliti saran dan petunjuk berikut, dan sebisa mungkin mematuhi. Terima kasih.

- Hanya dapat menerima teks dalam bahasa Esperanto dan Indonesia.
- Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu dari dua bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasannya, maksimum 100 kata dalam bahasa lainnya.
- Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksalah tulisan tersebut lebih dahulu dengan orang lain (teman) yang lebih memahami. Hal itu dapat dilakukan di pertemuan Esperanto, sebagai bagian dari pembelajaran atau secara online. Kesalahan dalam tulisan sebisa mungkin diminimalisasi dan tulisan dalam gaya bahasa yang baik.
- Mohon kirimkan tulisan dalam salah satu format berikut: **.txt**, **.rtf**, **.doc**, **.odt**. Hanya jika Anda tidak bisa mengirimnya dalam salah satu format yang telah disebutkan, kirimkan tulisan dalam format **.docx** atau **.wpd**. Jangan kirimkan tulisan dalam format **.pdf**!
- Jika Anda menggunakan 'pengganti' huruf Esperanto, gunakan format yang sama untuk seluruh dokumen.
- Gunakan hanya satu jenis huruf untuk satu dokumen.
- Jika mungkin, kirimkan juga gambar, sebisa mungkin yang berkualitas tinggi, dan sebaiknya tidak disertakan dalam dokumen teks. Gambar harus dikirim terpisah, dengan informasi untuk masing-masing gambar: penjelasan judul gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat fotonya, jangan kirimkan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim terlalu banyak gambar dalam sekali pengiriman. Beberapa foto bisa saja hilang dalam proses pengiriman.
- Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu.
- Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat untuk merespon permintaan redaksi dan 'mematuhi' batas waktu.
- Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: **redakcio-ideo@googlegroups.com**.
- Silakan kirim kontribusi artikel Anda melalui Facebook hanya ketika Anda sama sekali tak bisa kirim pesan e-mail, dan kirimlah pesan itu sekali lagi kalau Anda tak dapat konfirmasi bahwa artikel Anda telah diterima.
- Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.

ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraj subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompencan pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuaĵo konformas kun la celoj de la bulteno. Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas niajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj, laŭeble, sekvi ilin. Dankon.

- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la indonezia.
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume cent-vortan, en la alia lingvo.
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel eble plej seneraraj kaj en bona stilo.
- Bonvolu sendi la tekstojn en unu el la jenaj formatoj: **.txt**, **.rtf**, **.doc**, **.odt**. Nur se vi ne povas sendi en unu el la ĉi-supraj formatoj, sendu en **.docx** aŭ **.wpd**. Ne sendu **pdf**-dokumentojn!
- Se vi uzas surrogaton por la Esperantaj literoj, uzu la saman por ĉiuj literoj de la dokumento.
- Uzu nur unu litertipon por unu dokumento.
- Se eblas, sendu ankaŭ bildojn, laŭeble altkvalitajn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni aparte, kun la jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo - iuj povus malaperis survoje.
- Bonvolu sendi la kontribuajojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento.
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn.
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: **redakcio-ideo@googlegroups.com**.
- Sendu vian kontribuon per Facebook nur kaze ke vi tute ne povas sendi retmesaĝojn, kaj resendu ĝin se vi ne ricevas konfirmon pri la ricevo.
- Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La bulteno *Esperanto en Indonezio* aĉetebblas ĉe la Libroservo de UEA (libroservo@co.uea.org) kontraŭ 1 € / ekz. + efektivaj sendokostoj.